


POR KE ĈIUJ ESTU UNU POR KE ĈIUJ ESTU UNU  
UT UNUM SINT UNUM SINT



(Joh. 17,21)



# ESPERO KATOLIKA

*monata revuo fondita en jaro 1903 — oficiala organo de I.K.U.E.*

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

# internacia katolika unuiĝo esperantista

fondita en 1910

honora prezidanto: pastro A. Beckers

---

## Centra Oficejo

CH-9106 Zürchersmühle - Urnäsch  
Svislando

## Prezidanto:

Pastro D. F. Longoni  
I-20051 Limbiate (Mi)  
Italujo

## Kasisto

Paul Scherer - Graber  
CH-6020 Erlenstr. 58  
Emmenbrücke (LU)  
Svislando

## Sekretario

## Estraranoj:

A. Berka - Ĉeĥoslovakio  
W. Mudrak - Aŭstrujo  
P. M. Casanoves - Hispanujo  
P. L. Kis - Jugoslavio  
P. W. Flammer - Svislando  
K. Van Kleef - Nederlando  
N. W. Vigar - Anglujo  
M. Švaček - Ĉeĥoslovakio  
D-ro K. Perko - Aŭstrujo

## Oficiala Revuo

Espero Katolika  
(Fondita en 1903)

## Redaktoro:

P. Felice Ruaro  
37010 Costermano (Vr)  
Italujo

## Abonkotizo

sFr. 14,=

---

Redakcio de E.K. kaj membrolistoj  
V. Ghiacciaia 3 — I-37100 - Verona (Italio)

## NIA 70 JARA REVUO

En la januara numero (p. 4-5) ni vidis, ke E.K. kiel revuo naskiĝis en 1903. La unua numero aperis en oktobro, ĝuste antaŭ 70 jaroj. La revuo estis malfermita al ĉiuj esperantistoj, ankaŭ nekatolikaj kaj eĉ nekristanaj. Tian toleremon la redaktoro intencis praktiki ankaŭ sur la lingva tereno. Li skribis: «Al ni do venu ili, kiuj, ĝisnune timemaj, ne kuraĝis esprimi siajn ideojn! Ili ne turmentiĝu pri la gramatiko, pri la korekteco de siaj frazoj; ili nur penadu laŭvere vivi, laŭvive pensi, laŭpense, klare, kompreneble verki... Kiel eble ni korektos la mankojn de l' stilo, sed ne volas esti profesoroj pri gramatiko».

La faktoj baldaŭ montris, ke ĉi lastaj principoj kaŝis en si la ĝermojn de troa lingva libereco kaj nekorekteco.

Preskaŭ tuj venis protestoj de ĉiu flanko. Sac. Peltier deklaris: «Mi bedaŭrinde allasis kelkajn ŝanĝetojn pri la lingvo, kaj nia unua numero je sia eniro en la mondon ne tre plaĉis al la gazetaro esperantista». La redaktoro, s-ro Auroux, montris ofte sian inklinon al «plibonigoj» de la Zamenhofa lingvo, tial Peltier sentis sin devigita al grava decido: li komprenigis al la redaktoro, ke li «kompromitis la revuon», tiel ke Auroux donis sian eksigon el sia ofico. Tiu decido aperis en E.K. kiel postnoto sub la represo de letero de doktoro Zamenhof al la direktoro de «Belga Sonorilo», en kiu la majstro starigis jenan principon: «Simile al ĉiu alia lingvo, Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo finita kaj netuŝebla. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povos nur tiam, kiam nia lingvo estos jam oficiale akceptita en la tuta mondo.

Ĝis tiu tempo la netuŝebleco de la lingvo estas la plej fundamenta kondiĉo por nia propagando».

Peltier aldonis: «Ni aliĝas al tiu grava deklaro de l'aŭtoro de Esperanto. EK uzos kiel eble plej zorge la lingvon Zamenhofan laŭ reguloj kaj modeloj liveritaj de nia majstro». La franca sacerdoto tiel unuigis en si mem la kvar funkciojn de direktoro, redaktoro, administranto kaj propagandisto.

La provoj ne ĉesis. La fervora pioniro, sekvante la konsilojn de kelkaj esperantistoj, volis ankoraŭ foje fondi internacian societon por katolikaj esperantistoj; bedaŭrinde — malgraŭ la diligenta preparado — ankaŭ la duan fojon tiu societo ne atingis la «alian bordon». Ankaŭ la financa pozicio estis malbona, tiel ke Peltier vidis sin devigita elekti inter du ebloj: haltigi definitive sian pioniran agadon aŭ fari ĉion eblan por interesigi multajn katolikojn kaj daŭrigi sian gravegan taskon. Li diris: «Ni semas. Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas; ni semas konstante», kiel Zamenhof.

En la januaro 1905 li publikigis en EK urĝan alvokon al la katolikaj esperantistoj, kiun ni devus mediti:

«La katolikoj ne devas forgesi, ke se ili volas havi specialan revuon, ili devas krei por ĝi legantaron per propagando senlaca en katolikaj familioj, firmoj, societoj... Ne kontentiĝu trankvile legi vian revuon, sed ĉiu el vi fariĝu fervora propagandisto; ĉiu el vi igu nin koni sian agadon por ke ni verku raporton legindan al la Kongreso». Tiam oni preparadis intense la unuan universalan kongreson en Bulonjo-ĉe-Mar (Boulogne sur Mer), en kiu ankaŭ D-ro Zamenhof estis partoprenonta.

Karaj gelegantoj, ni legis pri la unuaj paŝoj de nia revuo, pri la senlaca kaj apostola agado de Sac. Emile Peltier. Mi volas fini mian artikolon per liaj vortoj: «Esperantistoj, ne malŝparu tempon en etaj malpacoj. Ni ĉiuj laboradu frate, unuiĝe, fervore!».

*La Redaktoro*

*Mia koro ripetas senfine, ke mi volas vin, nur vin. Ĉiuj deziroj, kiuj tage kaj nokte distras min, estas falsaj kaj vanaj.*

*Kiel la nokto kaŝas en la mallumo sian deziron de lumo, tiel en la profundo de mia spirito krio sonas: «Mi volas Vin».*

R. Tagore



# Geedziĝa festo dum la Kongreso

*El la longa raporto de D-ro Kondor pri la E-Kongreso en Luksemburgo mi elĉerpas raporteton pri geedziĝo.*

La redaktoro

La plej granda sensacio de la tago (10-a de junio) estis la internacia geedziĝa festo en la preĝejo de Paco.

S-ro Petro de Smedt el Belgujo gvidis al la altaro f-inon Kjoko Hata el Japanio. Atestantoj estis: S-ro Harald Ralph kaj juna negra studento el Senegalio. La eklezian celebron faris pastro Ciccanti el Rimini kaj pastoro Brinkmann el Germanujo. Dum la solenaĵo kantis granda ĥoruso el Belgujo, kiu aparte veturis al Luksemburgo per aŭtobuso. La viroj staris malantaŭ la altaro en blankaj ĉemizoj, la virinoj en blankaj bluzoj. La dirigento estis entuziasma sinjoro, kiu ne nur sian ĥoruson, sed ankaŭ la tutan ĉeestantaron povis instigi al ĝoja kunkanto. Li nomiĝas Pousseur. La organistan laboron plenumis kun granda lerteco S-ro Jo Haazen. La kortuŝan alparolon faris S-ino Koopmans. Dum la ceremonio fulmis konstante la fotoaparatoj kaj zumis la filmaparatoj kaj nia jugoslava amiko Smoliĉ diligente surbendigis la voĉon de la solenaĵo. Poste la juna, ĉarma paro invitis la kongresanojn al amika trinkado en la restoracio de la kongresejo.

---

## ANONCOJ

Helpo al orientaj fratoj. Multaj orientaj IKUE-anoj deziras ricevi E.K., sed tio sukcesas nur se ĝi estas en fermita koverto kiel letero. Tio postulus troajn elspezojn por nia Asocio. Do nia Prezidanto faris proponon, kiun ni publikigas.

Multaj okcidentaj anoj povas peti de nia redakcio du ekzemplerojn de E.K.: unu por si mem, unu sendendan fermite al orienta frato. Oni avertu la redakcion de E.K. pri tio kaj ni sendos la nomon kaj adreson de orien-

ta frato. La samideanoj, kiu akceptas tiun ĉi proponon, pagos nur unu kotizon, la sian, kiel antaŭe.

Skribu al la direktoro de nia ekspedoficejo: S-ro Franco Galbusera, Vico Ghiacciaia 3 - Verona - Italio.



Aperis la libro «Ekumenismo kaj internacilingva problemo — Language and ecumenism» de P. Georgo Korytkowski, kiun ni tre varme rekomendas. P. 180. Prezo: 3 us. dolaroj aŭ 1800 italaj liroj.

Mendu ĝin al P. Jacobitti aŭ al la aŭtoro P. Georgo Koritkowski, G.R.A. km 68,8 - 00163 Roma; aŭ al la Centra Oficejo de IKUE: P. Flammer - Zürchersmühle (Urnäsch) - Svislando.



Biblia revuo estas trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj. Adreso: Piazza Duomo 4 - 48100 Ravenna (Italio).

---

# Solena ofero al Dio

(El «SKLAVOJ DE DIO»)

*Reĝidino Margit estas kun aliaj knabinoj en la monakinejo sur la Danuba «Insulo de la leporoj» ĉar ŝiaj gepatroj Bela (Adalberto) la IV-a kaj lia edzino oferis ŝin al Dio, por ke Li liberigu Hungarujon de la tatara invado.*

*Por la religiã voto de Margit venas al la monakinejo la reĝa paro, episkopoj, dominikanoj, premonstratanoj, nobeloj...*

Jen, jam ĉi tie la pramo! La kanto eksilentas.

La reĝo surmetas sian felĉapon. La sinjoroj restas nudkape. Ili malsuprenpaŝas sur la sabla bordo al la pramo. La reĝo estas antaŭe kun la reĝino, la sinjoroj en duoncirklo malantaŭ ili.

Du pramistoj sur la bordo kaptas la pramon per kroĉhakiloj. Ondo plaŭdas... La pramo albatigas borden. Unu el la pramistoj desaltas kaj kusigas vastan plankon, kiel ponton al la bordo.

La kruc-tena, blankvizaĝa knabineto transpremas la krucon en la manojn de alia monakino kaj eksaltas kiel la unua. Kun disetenditaj brakoj ŝi flugas en la brakojn de la reĝino kaj feliĉe ĝemas: «Patrino mia!».

\* \* \*

La ĉefepiskopo akceptis la monakinojn en la pordo de la preĝejo. En blanka surpriso li staris tie kaj tenis malgrandan, arĝentan krucifikson en la mano. Liaj malgrandaj okuloj oftege palpebrumadis, poste li ekparolis:

— Piaj monakinoj de predikista ordeno! Ni salutas vin sur tiu ĉi tero benita de Dio. Nova klostro atendas vin ĉi tie, kiel pia ofero de nia reĝina moŝto. Venu, portu kun vi tiun ĉi karan, reĝan knabineton, kiun kiel blankan ŝafideton la majesta reĝa paro dediĉis al Dio, por ke Dio forigu de tiu ĉi multe suferinta patrujo la detruantajn, kruelajn tatarojn kaj, se ankaŭ en la futuro Dio rigardus tiun ĉi landon per koleraĵoj, Li rimarku en ĝi la preĝantan vizaĝon de tiu ĉi senkulpa infano. Venu! Atendas vin la nova, benita hejmo.

La popolo kun ploraj okuloj aŭskultis la paroladon. Neniu troviĝis tie, kiu ne suferus dum la tatara invado forpasinta antaŭ apenaŭ dek jaroj. Ĉies okuloj turniĝis al la reĝa knabineto. Ankaŭ ŝi staris tie afliktita; ŝiaj senkulpaj, sinceraj okuloj pie rigardis al la vizaĝo de la ĉefepiskopo. Poste la monakinoj laŭvice kisis la krucifikson kaj unuope enpaŝis la preĝejon. Kun ili eniris la reĝa familio, la pastroj kaj la popolo, — nu, kiu kapablis.

Interne ĉiuj genufleksis kaj mallonge preĝis. La ĉefepiskopo kun alia bela parolo transdonis la ŝlosilojn de la monakinejo al la kurbadorsa Umbertus, kiu denove transdonis ilin al alia, maljuna, tre nigrabrova monako, al tiu, kiu akompanis la monakinojn. Oni povis aŭdi, ke oni titolas la monakon provincialo kaj frato Mihály estas lia nomo. Jancsi (frato de la apuda monakejo) rememoris, ke li jam vidis lin: kiam la unuan fojon li vidis la reĝon.

Frato Mihály promesis, ke li tutkore zorgos pri la klostro de la monakinoj kaj pludonis al maljuneta monakino, kiu estis verŝajne la ĉefulino inter la monakinoj, la ŝlosilojn.

# SKLAVOJ

(El la romano «Sklavoj de Dio»)

La ebriulo kriis al Sicardus (dominikano):

— Kiuj vi estas? Ĉu vi estas monakoj? Frenezuloj vi estas. Vi ne scias, kio estas la bono.

— Kompreneble, — respondis Sicardus trankvile, — ni vidas: en koto kuŝi estas bono.

Kaj li pasis plue.

— Ĉu vi vidas? — li diris al Jancsy —, tiu ĉi homo ŝajnas al vi sinjoro, sed li ne estas sinjoro: li estas sklavo: sklavo de korpo.

Grupo da nigramantelaj homoj staris sur la strato antaŭ domo pli interne situanta ol la aliaj... Meze de la grupo staris tableto; ĉe la tableto maljunega judo kalkulis arĝentajn denarojn antaŭ tri junuloj. La kvara skribis. Sicardus mallaŭte diris:

— Vidu: sklavoj de mono.

Kaj sen pluaj vortoj li preteriris.

Malsupre, ĉe la varm-fonta muelejo, tri velurdolmanoj, velurĉapaj sinjoroj preterrajdis. La vento dekstren — maldekstren hirtigis la kolharojn de la ĉevaloj. Multaj orĉenoj sur ili brilis, agrafoj sur iliaj ĉapoj, brilantaj ŝtonoj sur la glavoj.

— Vidu, — diris Sicardus, — sklavoj de pompo.

Jancsy gapis al ili.

— Ĉu ĉiu estas sklavo? — li demandis timeme.

— Ĉiu, — kapjesis Sicardus.

— Ĉu ankaŭ la reĝo?

— Ankaŭ la reĝo.

— Kies sklavo li estas?

— Sklavo de nacio.

— Ĉu ankaŭ ni estas sklavoj?

— Ankaŭ ni.

— Kies sklavoj ni estas?

— Sklavoj de Dio, mia frateto.

Senvorte ili iris plu, atingis la rodon. Dum la atendo Sicardus alridetis la knabon:

— Kion vi opinias? kies sklavo esti estas pli bone? ĉu tiu de sinjoro? de bienego? de domo? de virino? aŭ de la bonega Dio?



---

HENRYK WOLNIAK - 1939

el la poemaro: «Proch»/«Polvo»  
eld.: «Ossolineum», 1972

---

# *Kunkreado*

I

Vivo — per kio mi meritas ĝin  
ja la gepatroj miaj timtremante  
pri la rikoltoj  
fruntoŝvite kultivas la teron  
produktantan grenon  
kune kun falĉilo  
Kaj mi la homo feliĉa  
parencita al larmoj  
preĝas ĉiam pri la morto  
bela bona kaj la vera

II

Mi serĉis Vin sur la tuta tero  
kiam mi tuŝadis la oran plektaĵon  
riveroj kiel serpentoj  
ĉirkaŭplektis la brakojn  
Mi enrigardis  
en la korinternon de la praarbaro  
ne pafas jam tie l'homa armilaro  
Per kaninoj de l'sovaĝaj bestoj mi  
disŝirita elĵetita  
ekster lastan arbon  
apenaŭ pingloj arbaraj  
kunkudris la vundojn  
ĝustatempe

Al maro mi ŝuldas la ŝtonon ĉe la kolo  
al montoj oni donis ĝibojn  
pro la orgojlo de ilia alteco  
Kiam mi vidis flugilojn  
ekruĝigis la ĉielo  
tien mi viva sen kruco  
ne aliros  
Mi rigardas profunden en teron  
humila filo de l'mutaj vortoj tombisto  
prodiginto en herboj  
falĉita kun herbejo  
kaj la spuro ruĝpapavo  
Mi serĉis Vin sur la tuta ĉielo  
en mortaj maroj kirlante per larmoj  
silenton de l'dronitaj ŝipoj  
Serĉis ankaŭ la Dio  
ne memorante  
ĉu nur la spiriton enblovis Li  
en ripon  
kaj eble Li songis pri Vi  
post penoj de l'Sankta Semajno

### III

Fulmobrilo — anĝeloj prezentas armilon  
antaŭ Dio-homo najlita al kruco  
Golgoto — tie ĉi lanco  
plena de l'vinagro kaj galo  
iras preter la koro  
inter la ripoj  
Ho Tero kaj Tombo  
Dio kun vi  
kaj la ŝtono  
REZUREKTO

*El la pola esperantigis*  
Jan Smykalski

---

## Patro Josef Štemberka de Lidice

---

El la sacerdotoj, kiuj en jaroj 1926-1930 laboris en la regiono Kladno, nune vivas eble nur du. Ili kunvenadis por partopreni la vikariajn konsultojn en paroĥejo Kladno. Tie bonvenigadis ilin bonkora «laborista» dekano Patro Josef Skála, famiĝinta pro sia karitativa agado kaj afableco.

El la membroj de tiama vikaria distrikto elstaris ĉefe dekano de Unhošt, prudenta kruckavaliro Patro Melichar; bona predikanto Patro Petrásek el Vrapice — kiun pli poste persekutis Gestapo, same kiel kateĥisto Patro Kopriva, kiu konstruis preĝejon en Rozdelov kaj fine paroĥestro de Lidice Patro Štemberka. Lia rondforma griza kapo estis unuavide okulfrapa en tiu ĉi malgranda eklezia rondo. Lia nune konata kaj distribuata portreto ne estas konforma. Vizaĝo de Štemberka havis multe pli akrajn trajtojn — lia rigardo ĉiam koncentrige serioza — ne tiel optimisme modelita kiel ĝin prezentas pentristo Pavel Lisy. Patro Štemberka emis malmulte paroli — parolante do nur logike. Oni juĝis lin esti bona juristo. Krom tio li, malgraŭ sia alta aĝo — eble kiel unua paroĥestro de sia vikaria distrikto — mem uzadis kaj ŝoforis aŭtomobilon.

En vikariejon venadis lia hejma helpantino Tonička por plenuni diversajn oficajn aferojn. Verŝajne ankaŭ ŝi pereis kun ceteraj virinoj de Lidice en koncentrejo. Ankaŭ ŝi estis same malparolema kiel ŝia estro. Timeme ŝi venis — kon-

cize ŝi plenumis sian taskon kaj kiel diskrete ŝi venis, tiel same ankaŭ malaperis.

Oni ŝatis Patron Štemberka ĝuste pro lia malparolemo kaj modesteco.

Estas necese distingi la komfortemon, egoisman enfermitecon dis de la kvieteco venanta de la interna koncentriĝo kiu elradiis de la personeco de Patro Štemberka. Tiu ĉi egalanimeco donis eblecon por kreskigi tiom grandan spiritan forton, kiu sin manifestis en plej krizaj momentoj de la vivo — kiam en kela spaco de bienulo Horák li estis preparanta siajn paroĥanojn por ekzekuto.

Mi estis translokigita de Kladno al Praha. Por plenumo de la studaj bezonoj denove mi proksimiĝis al apudesto de martiro de Lidice. Pro la komisiono ŝarĝita de la redakcio de Gazeto de katolika ekleziularo, mi devis trastudi la Memorlibron kaj plej malnovan matrikulon de Lidice. Ĉar ambaŭ ĉi tiuj dokumentoj pri la estinta vivo en Lidice estis okaze de la detruo de la komunumo bruligitaj — estas miaj laboraĵoj grava, kvankam nur eta historia dokumento de la loko nune ege memorinda. La plej malnova matrikulo de Lidice estis fondita en jaro 1664-a kaj enhavis kompletajn enskribojn pri la baptoj ĝis la aro 1698-a. Ĝi fakte estis konsignacio de la loĝantaro de Lidice, Buštehrad, Belok, Vretovice, Stelčeros, Makotrasy, Drìn, Brandysko, Ujezd kaj Cvrkyne.

Ĝia neniigo estas tre grava perdo por multaj scienco-fakoj.

Paroĥejo Lidice posedis ankaŭ relative valoran Memorlibron, devenantan de la jaro 1732. Laŭ ŝtata ordono similaj memorlibroj — vilaĝajn kronikojn — estis fondataj nur post la paro 1836-a. Paroĥestro de Lidice Antonio Vacek estis fondinta la memorlibron jam 100 jarojn pli frue. Li konsciencie enskribadis interesajn okazaĵojn de la tuta regiono.

Kvazaŭan antaŭsignon de estonta tragedio travivis Lidice dum la Sepjara

milito, kiam soldatoj de Germana-Franca armeo invadis vilaĝon la 23-an de novembro 1741; post la venkopreno de Praha. La enskribo en la kroniko mencias — krom aliaj — malaperon de kastelo Tasov. Rememorante paroĥestron Bezdek oni aprezis liajn meritojn pro la konstruo de lernejo en jaro 1825. Skribante pri la preĝejo en vilaĝo Drin la paroĥestro-kronikisto uzis distikon: *Ne restadas en arbaro Johano-Baptisto sola tute, ĉar pasigas kun li tie civitanoj de Drin. Dubi kaj Cvrčovice.*

---

## *Por profundigo de la kulto de la Eucaristio*

En la baziliko de S. Johano Bosco en Torino, sur unu de la muroj oni vidas imponan mozaikon, kiu prezentas teruran, eskatologikan vizion de la sanktulo. Jen ni vidas, ke furiozaj ondegoj suprenlevas kolosan, malplenan hulon de la ŝipo, sen veloj, sen mastoj kaj sen rudroj. Sur ĝi — kun superhoma dimensio — Persono de la sankta Patro, rudristo de la Petra boato. Li tenas ambaŭmane grandan hostimontrilon kun la tre sankta Hostio.

Kiom signifoplena! En la furioza ŝtormo, kiun dum «lastaj tagoj» travivos la Eklezio, kiam apokalipsa «besto» frakasos la mastojn kaj velojn, la ununura ŝanco de la savo estos la Eŭkaristio, kiun en la fortikaj manoj tenas la Anstatuanto de Kristo.

Ni vidas, ke la atakoj kontraŭ nia kredo iras en tri direktoj:

1. Elŝiri nian kredon je la efektiva ĉeesto de Dio en la Eŭkaristio.
2. Subfosi ĝin kaj ŝanceli per la enkonduko de la konstanta moro akceptadi la Sanktan Komunion sub du formoj, tiel ke ni, gradon post grado, ensorbos la senton de neplensato kaj dubindeco kiam ni ricevas Dion sub la formo de pano.
3. Restriktadi — kiel ekz. en Nederlando — la plej senperajn kontaktojn kun Dio per likvidado de la Diservoj kaj procesioj kun Sinjoro Jesuo en Hostimontrilo, por neniigi la neceson de la koro de tiuj ĉi senperaj kontaktoj en la kulto de Dia Korpo.

Kaj jen alia formo de atako kontraŭ la kulto de la Sanktega Korpo de Kristo: ofte oni vidas (dank' al Dio en Polujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Hungarujo ankoraŭ ne), ke oni enkondukas tute senbezonan kutimon meti la tre sanktan Hostion sur la manon, ofte malpuran, nesanktoleitan per la pastrecaj Oleoj, eksponante la Korpon Sanktan de Kristo al la insultoj de homoj malfortaj en la kredo aŭ profanaj.

La plej signifoplena ekstera esprimo de nia kulto kaj estimo estas la genufleksa pozicio. Kial nun, sen bezono kaj sen klara motivo oni enkondukas kaj toleras starantan staturon dum la ricevo de Jesuo? Kaj ja ni plue kantas: «Tantum ergo Sacramentum veneremur cernui: tiom grandan Sakramenton ni honoru surgenu!».

Kial malhumile kaj fierege, preskaŭ provokante kaj malrespekte, oni akceptas en la koron la senfinan Dion?

Ankaŭ en aliaj okazoj de celebrado de la kulto ni vidas tendencon al enkonduko de la plej oportunaj, preskaŭ neglektaj formoj. Tio ĝuste aŭtentikajn adorantojn de la Plej Sankta Eŭkaristio plenigas de ĉagreno aŭ eĉ terurigas senpere. Do tio ĉi devas esti progresema katolikismo? Kontraŭe. Tio estas reveno al la plej primitivaj formoj.

La problemon de «disvolviĝo kaj maturiĝo de la dogmoj» la II-a Vatikana Koncilio finprecizigis. Kaj ni kion volas fari? Propramane malprofundigi, senfortigi kaj deprimi tion, kio estas plej sankta, kio estas plej kara: la Dian Korpon.

Mi deklaras, ke ĉio, kion mi supre diris, estas mia persona vidpunkto, kun kiu multaj katolikoj samopinias. Sed se io kolizius kun la vidpunkto de la Eklezio, mi estus preta ŝanĝi la opinion, ĉar mi ne volas ion publikigi «contra fidem», kontraŭ la fido.

*Dominik Boklak*  
Krakovo - Pollando

Noto de la redaktoro. - *Kiel dirite, la aŭtoro de l' artikolo esprimas sian vidpunkton, kiu respegulas mentalecon kaj religian senton de iuj landoj, kie eksteraj formoj estas konsiderataj forte kunigitaj kun sento kaj konvinkoj. Oni povas diskuti pri tiu ĉi artikolo; ĉiuokaze oni devas memori, ke antaŭ ĉio gravas la interna respekto, la amo, la dankemo al Dio kaj ke la ekstera manifestacio ludas duarangan rolon.*

*Maria estas en la centro de la sava plano de Dio, apud Kristo nia Savinto. Do la bona sukceso de la Sankta Jaro dependos de la helpo altvalora de la Dipatrino.*

Paŭlo VI-a





Ni prenas el la sintakso «Perfektiga kurso» de Daniel Quarello (E.K. N. 9) utilan paĝon pri «specifaj komplementoj».

Ni scias, ke kiam adjektivo esprimas kvaliton aldonan, provizoran, ckazan de substantivo, ĝi formas specifan komplementon, kiel:

Mi trovis tiun vinon bona.

Li kolorigis la grizan muron flava.

Tie ĉi la specifa komplemento estas ĝuste indikata de la manko de la karakteriza signo de la akuzativo -n.

Nun ni konos alian klason de specifa komplemento formata de subsantivo:

Mi elektis Marion prezidanto.

(= Mi elektis, ke Mario estu prezidanto).

Antaŭe Mario ne estis prezidanto, sed mi elektis lin tio.

Alberto nomis lin estro (Alberto nomis, ke li estu estro).

Antaŭe li ne estis estro, sed Alberto nomis lin tio.

Specifaj komplementoj povas ankaŭ formiĝi per «kiel» uzata kiel prepozicio. Tiel:

Mi elektis Marion kiel prezidanton.

Alberto nomis lin kiel estron.

Kies signifo estas plene egala al tiu de la antaŭaj propozicioj. En ĉi lasta kazo kun kiel la vorto, kiu formas la specifan komplementon, devas akordiĝi laŭ kazo kun la vorto, kies komplemento ĝi estas.

Se mi dirus: Mi elektis Marion kiel prezidanto,

tio signifus: Mi, kiel prezidanto (= mi, kiu estas prezidanto),

elektis Marion. La signifo estus tute alia.

Ankaŭ la adjektivoj, kiam ili rolas kiel specifaj komplementoj enkondukataj de «kiel», observas la saman regulon. Tiel:

Neniu nomis tiun viron malhonestan.

Neniu nomis tiun viron kiel malhonestan.

La signifo de ambaŭ propozicioj estas:

Neniu diris, ke tiu viro estas malhonesta.

Same ankaŭ: Mi juĝis tiun vinon kiel bonan,  
Johano juĝis tiun personon kiel lertan,  
Ili juĝis la knabon kiel senkulpan...

Kiam oni parolas pri fikcia, nereala fakto, anstataŭ «kiel» uziĝas «kvazaŭ». Tiel:  
Oni akceptas lin kiel reĝon

signifas ke li estas vere reĝo, oni akceptas lin, kiel oni akceptas reĝon.  
Sed la jena propozicio:

Oni akceptas lin kvazaŭ reĝon

signifas, ke oni akceptas lin, kiel se li estus reĝo. Kaj la valoro de tiu ĉi propozicio estas:

Oni akceptas lin, kvazaŭ oni akceptus reĝon.

Sed li ne estas reĝo.

Specifa komplemento povas ankaŭ esti komplemento de alia komplemento, kiel en:

La verda stelo kvinpinta estas la simbolo de Esperanto kiel lingvo.

Specifa komplemento povas esti akompanata de kvalifaj epitetoj:

Oni nomas Amerikon la nova kontinento.

Romo estas nomata la urbo eterna.

La popolo elektis lin ŝtata sekretario.

Foje specifa komplemento povas esti akompanata de adverbo maniera, kvanta, nea ktp.: tiel, tiom, tre, ne ktp.

aŭ de superlativo: kiel eble plej, laŭ eble plej... Ekz.

Li muldis la statuon tiel bela.

La pentristo pentris la virino tiom ĉarma.

Mi sentas min tre feliĉa.

Vi forlasas mian domon ne konsolita.

Ili faru sian situacion kiel eble plej oportuna.

Notu al vi, ke specifa komplemento kutime lokiĝas post la substantivo specifata. kaj ĝiaj epitetoj. Tial, neniam oni diras:

Oni vidis unu ludanta infanon.

Oni vidis la (aŭ tiun) ludanta infanon.

Sed oni devas diri:

Oni vidis ludanta unu infanon (= oni vidis unu infanon ludanta; oni vidis, ke unu infano ludas).

Oni vidis ludanta la infanon.

Oni vidis ludanta tiun infanon.

# EUROPISMO

*El la hispana revuo «Boletín de la federación española de Esperanto mi elĉerpas interesan artikoleon de Pedro Nuez (nov.-dec. 1972, p. 16).*

La redaktoro

En la gazetaro konstante aperas polemikaj artikoloj rilate la eŭropan merkaton; ŝtatestroj kaj unuaj ministroj kunvenas por establi aliancojn; influantaj kompanioj postulas la pligrandigon de partoprenantaj landoj en eŭropaj traktatoj; elstaraj ekonomikistoj diskutas pri doganoj kaj la verda Eŭropo (tio estas, pri la interŝanĝo de agrikulturaj varoj); ĉiutage iĝas novaj kontaktoj, periodaj kunsidoj, favoraj opinioj... Ni ĉiuj konstatas, ke ekzistas emo, inklino, direkto al tia bonvolemo por starigi tutkontinentan pacon, por disvastigi eŭropan komunan kulturon, por formi veran eŭropean unuiĝon. Ŝajnas, ke tiu idealismo estas moderna, ke ĝi kreiĝis nuntempe. Tamen la koncepto pri la eŭropa ideo, konata ankaŭ kiel eŭropismo, estas tiel antikva kiel la historio mem... (La aŭtoro analizas lerte la ĉefajn trajtojn de tiu historia stadio ĝis la nuna tempo).

Post kruela milito spruĉas la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu verŝajne solvos ĉiujn mondajn problemojn. Denove konferencoj, kunvenoj, aliancoj. La ideo pri Eŭropo firmiĝas kaj entuziasme kreskas. La eŭropa movado startas. La eŭropa merkato estas preskaŭ realeco. Tiu revo ne estas fantazio.

Tamen, ni ne estu naivaj. Se ni profunde analizas la realon, ni tuj konstatas, ke ĉio estas nur bonvolemo. Vere ni estas ĉe la sama mejloŝtono kiel niaj antaŭuloj.

La unua grava problemo eŭropa estas la Babelismo. Sen komuna lingvo, sen neŭtrala lingva instrumento, kiu faciligu la interŝanĝon de pensoj kaj sentoj, la eŭropanoj estas kvazaŭ fremduloj en Eŭropo. Neniu nacia lingvo povas roli kiel eŭropa komunukilo. Nur Esperanto, la milfoje laŭdata Esperanto, estas la lingvo kiu kapablas doni al la Eŭropanoj la efikan rimedon kaj instigilon por vera kaj konscia eŭropismo.

Neniam la homoj akordiĝos pri elekto de nacia lingvo, ĉar ĝi uzata kiel internacia fariĝus imperialisma lingvo, kaj lingva imperialismo alportas

la sklavecon de kulturoj kaj privilegion en la komerco kaj en la politiko. Post la solvo de la Babelismo, ni devas senarmigi armeojn, detrui monopolojn, forpeli kastajn privilegiojn, elradikigi rasajn kaj klasajn antaŭjuĝojn, forigi absurdajn landolimojn, nepre establi la justan distribuon de la produktaĵoj.

Malcentralizi ŝtatojn, akceli la internacian komercon sen interventoj de registaroj nek artefaritaj baroj, aboli intrigajn politikajn partiojn, ke ĉiu rajtu je la kulturo, ĉar ni, la homoj, nur bezonas justecon kaj liberecon. Kaj pere de tiuj du rajtoj, justeco kaj libereco, ni atingos la feliĉon, la fratecan harmonion, la mondan pacon kaj amon.

*Pedro Nuez*

---

## Itala epizodo

S-ro Timmins rakontas amuzan aferon. «Antaŭ ok jaroj mi estis en Romo, atendante la malfermon de la I.K.U.E. Kongreso. Mi loĝis en hotelo, kiu situis sur la ĉefstrato, kaj ĉiun nokton estis mia kutimo ĉe enlitiĝo meti mian monujon kaj miajn vojaĝ-dokumentojn sub la kapkusenon, kompreneble pro timo de ŝtelistoj; kaj matene post ellitiĝo mi forprenis kaj enpoŝigis ilin.

Nu, dum mia foresto ĉe matenmanĝo la ĉambristino tage purigis mian ĉambron kaj ordigis la liton; sed iun matenon mi forgesis miajn monujon kaj dokumentojn sub la kapkuseno kaj malsupreniris por matenmanĝo sen ili. Post la manĝo mi petis forpermeson, ekstaris, palpis miajn poŝojn kaj malkovris mian perdon. Ho ĉielo! Kun tremado mi rapide supreniris al mia ĉambro, kiu estis jam ordigita, iris rekte al la litokapo, levis la kapkusenon. Jen kuŝis miaj monujo kaj dokumentoj! «Kia liberigo!» mi diris enmense. Mi kontrolis la enhavon de la monujo kaj trovis ĝin korekta, kaj la dokumentojn sendifektaj. Pro tio mi intencis rekompenci la ĉambristinon pro ŝia honesteco. Do, la sekvantan matenon mi atendis ŝin en la ĉambro antaŭ la matenmanĝo.

Kiam ŝi eniris la ĉambron, mi penadis per mia limigita Itala gratuli ŝin pro ŝia honesteco, sed ŝi kapneis, ne komprenante mian Italan lingvon. Do por komprenigi ŝin, mi proponis al ŝi monbileton, samtempe fingrontrante la kapkusenon. «Ho ne, ne!» ŝi ekkriis Itale, «mi jam havas edzon!». Mi estis tute miskomprena kaj mi devas konfesi, ke mi iome ruĝiĝis.

Do, por komprenigi ŝin pri la vera stato de aferoj, mi elpoŝigis mian monujon, metis ĝin sub la kapkusenon, retiris ĝin, enmanigante al ŝi la monbileton. Finfine kompreno lumigis ŝiajn okulojn kaj kun ĉarma rideto ŝi akceptis la rekompencan.

# *En plifruaj jaroj*

En plifruaj jaroj, tempo antaŭlonga  
Mi sidis sur la genuo de la avo,  
Mi estis, kiel oni diris, petolema;  
Ne scias mi, ĉu vera estas ĉio.

Jes, mi ofte tiris lian barbon  
Kaj per sablo lian pipon mi plenigis,  
En lian ŝtrumpon mi metis dikan ranon  
Kaj sur piedfingron lian mi ekstaris.

Mi ankoraŭ ofte aŭdas lin rakonti  
Pri ĉio kion faris mi plifrue,  
Kelkfoje ankoraŭ povas pale mi imagi,  
Ĉar memori longe estas malfacile.

Jam sur genuo lia mi kvazaŭ ĉevalrajdis  
Kaj li demandis kio poste mi fariĝos,  
Mi ankoraŭ scias kion mi tiam diris,  
Mi fariĝos tio kion neniam vi divenos.

Demandis li: «Doktoro ĉu monaĥo?»  
Mi diris: «Ne, tion ne ŝatas mi,  
Ĉu vi scias kio estas mia volo?»  
Mi fariĝos avo same kiel vi!

Trad. C. Wijn

Tiu, kiu en stel-plena nokto aŭ dum la entombigo de siaj familianoj neas Dion,  
estas tre malfeliĉa aŭ tre malbona.

*Giuseppe Mazzini*

\* \* \*

Kiam mi kredis, ke ekzistas Dio, tuj mi komprenis, ke mi ne faros alion ol vivi  
por Li. Mia religiã vokiĝo portas la saman daton kiel la donaco de la kredo.

*Charles De Foucauld*



# landaj reprezentantoj

---

## **Anglujo**

S-ro N. W. Vigar,  
28 Franklands Drive,  
Addlestone - Surrey

## **Aŭstralio**

S-ro V. J. Timmins,  
73 Alexandria Parade,  
Hornsby N. S. W.

## **Aŭstrujo**

S-ro W. Mudrak,  
Beatrixgasse 19/9,  
A-1030 Vien III, P. K. 105.713.

## **Belgujo**

S-ro E. Paesmans,  
L. Koepoortstraat 64,  
Antwerpen, Telef. 321751 P. K. 41 45 89

## **Brazilo**

B. E. L. Praça da Republica 54, 1 E.  
Rio De Janeiro

## **Ĉeĥoslovakio**

S-ro Ales Berka,  
Na Harazi 1423, Vsetin

## **Francujo**

S-ro Gaston Veron,  
Place de la Petite Bruyère,  
Donfront (Orne)  
P. K.: G. Véron  
CCP Rouen 1188-63 Z

## **Germanujo**

S-ro Gerhard Vogel  
Tondernstrasse 36, D-5 Köln 30  
P. K. Köln 166355

## **Hispanujo**

S-ro Miguel Martinez,  
Av.da San José 105,  
Pral. Zaragoza

## **Irlando**

S-ro J. O' Reilly,  
« Woodbine », Bluebell,  
Dublin 12

## **Italujo**

S-ro C. C. Ferrari,  
Viale dei Mille 37,  
I-20129 Milano Telef. 267.895,  
P. K. 3-7791

## **Japanujo**

S-ro Matubara Hatirô (Anselmo)  
596 Oosaka-HU Kisiwada-si  
Namimatu-Tyô, 4 ban, 5 gô

## **Jugoslavio**

P. Felix Stricki,  
Hadzi Melentija 75,  
YU 1100 Beograd

## **Kanado**

S-ino Pauline Proulx,  
790-80 E Rue Est,  
Charlesbourg, Québec

## **Kolombio**

P. Louis E. Palacios Toral,  
Apartado Aéreo 12-03,  
Cartagena

## **Koreo**

S-ro Paul Kiseng Kim,  
I. P. O. Box 2752,  
Seoul

## **Madagaskaro**

S-ro Ramanantsoa Claude  
Dominique Gérard  
Cité Ambohipo 469  
Tananarive

## **Nederlando**

S-ro S. P. Smits;  
Stahoudersring 326,  
Zoetermeer, P. . 685124

## **Nov-Zelando**

D-ro Hamway Johano,  
29 Arran str. Avondale 7,  
Auckland SW. 3

## **Polujo**

Pola Katolica  
Unuiĝo Esperantista,  
Zabrze, Skr. PT. 68

## **Portugalujo**

S-ro M. M. Lourenço Gouveio,  
Caixa Postal 456,  
Funchal-Madeira

## **Svislando**


S-ro Lutz-Parolo Johann  
Himmelrichstr. 61  
CH 6010 Kriens

## **Urugvajo**

D-ro R. Zeballos Morales,  
Fray Marcos (Flor)

## **Usono**

S-ro H. S. Corlett,  
7605 Winona Lane,  
Sebastopol, California 95472



---

Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)

---

Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando  
Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)

---

Presejo: SCUOLA GRAFICA — Istituto Salesiano S. Zeno - v. Minzoni 50 — 37100 Verona

---

Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70